# Informilo

Monata revuo de F L A N D R A  E S P E R A N T O - L I G O
Maandblad van V L A A M S E  E S P E R A N T O - B O N D

Jarkolekto / Jaargang N° 1   okt. 1981

Verantwoordelijke / Respondecas   Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14, B-2510 MORTSEL

---

29 OKT. 1981

L.S.,

Nia propono pri la reorganizo de nia administrado (vidu sept. 1981 p 9) akceptiĝis do okaze de nia administrantara kunsido de la 3-a de oktobro, eĉ se nur provizore.

Certe, tio plisimpligos la administran laboron, ĉiukaze sur grupa nivelo. Kompreneble vi devas denove alkutimiĝi al la nova situacio kaj ni komprenas ke tio por certaj ne estas facila tasko. Tamen konfesu ke la sistemo de la antaŭaj jaroj ja ne estis tre simpla. Sufiĉus rigardi nur la kotiz-tabelojn. Ĉu ili ne estis fontoj de miskomprenoj ?

La nova sistemo almenaŭ estas tiom klara, ke nun ĉiu povas facile elekti ekzakte kion li volas kaj kalkuli kiom tio kostas.

Ni nepre esperas, ke ĉiu bonvole pretos kunlabori en la ĝenerala programo.

Ankaŭ niaj bultenoj priparoliĝis. UEA-prezidanto Maertens multe ŝatus ke nia nacilingva revu(et)o (ESPERANTO PANOMRAMA) iĝu vera novaj-magazino, belaspekta kaj riĉenhava por ke ĝi povu servi kiel valora propagandilo por la ekstera mondo, por ne-esperantistoj, do. Vi ja konas lian devizon : "Eksteren !"

Kompreneble tio kostas monon kaj ne nur monon, ankaŭ, ĉefe eĉ, laboro .. KUNlaboro. Bona magazino ja ne povas esti la tasko de nur unu sola persono. Tial estas necese formi teamon, sed por tio bezoniĝas ... personoj.

I N F O R M I L O

Kadrogazeto. Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare

"INFORMILO" estas kontaktilo/ diskutilo inter la estraro kaj la membraro de FEL. Ĉiu povas partopreni en ĝi per personaj kontribuaĵoj. Tiuj ĉi kompreneble restu sub la respondeco de la kontribuantoj.

Tekstoj atingu la redakcion antaŭ la 10-a de la monato.

F E L - Ŝ P A R K O N T O

FIKSDATAJ MONDEPONOJ

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-7069801-50
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

LIBRO-SERVO ŜONORILO
Doornstraat 22
2610 WILRIJK
Direktoro : Monique VEREECKEN
Telefono : 031/27 24 05
Kontoj : 000-0152140-44
320-0342460-23

FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Arsenaalstraat 5
2000 ANTWERPEN
Telefono : 031/16 05 05
Direktoro : Paul PEERAERTS

FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
031/66 62 66
prezidanto, estrarano pri informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estrarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

René BUDTS, Pr. Rooseveltlaan 168/9
9000 GENT
091/ 23 53 48
respondeculo por Orient Fland[rujo]

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



En nia nuna situacio tio signifas bonvolemuloj - volontuloj !
Vere, malgraŭ la penoj kaj klopodoj kiuj jam okazas nun, malgraŭ la evoluon de la Internacia Lingvo, la movado ankoraŭ ne tiom progresis, ke por ĉiu necesa laboro atendas salajrata persono. Alivorte, ni ankoraŭ ĉiam dependas de la bona volo de niaj membroj.

Ankaŭ pri nia Esperanto-lingva bulteno (INFORMILO) okazis pridiskuto. Antaŭ kelkaj monatoj ni kreis INFORMILO-n fakte por permesi dissendi la protokolojn kaj ceterajn komunikojn je rabatita afranko kaj tiel ŝpari monon. Intertempe tamen montriĝis, ke la bulteno povus servi al multege pli kaj ke ĝi povus eĉ servi kiel vera, nacia revuo. (Pensu pri la iama FLANDRA ESPERANTISTO).

En tiu kazo tamen ŝajnas, ka la titolo ne tute taŭgas. INFORMILO, sen pli, ne estas kontentiga, ĉu ? Mankas io ...

Plie, ankaŭ en tiu rilato, la kunmetado , t.e. la kompleta redaktado, ne povas esti la tasko de nur unu sola persono. Do ankaŭ ĉi tie ni bezonas la kunlaboron de bonvolemuloj.

Do, jen nia demando : faru al ni sugestojn pri taŭga titolo por nia Esperanto-lingva bulteno kaj la komplezon sendi viajn redaktaĵ(et)ojn.

Vere, kiam ni alvokas al kunlaboro, ne timu ke tio signifus daŭra kaj seninterompa artikolverkado, kvankam tekstoj ĉiam estas bonvenaj. Tio, kion ni demandas estas ĉefe regula raportado pri kio okazas en viaj regionoj, en viaj kluboj ktp. Kial ne, ekzemple, priskribi viajn aktivecojn iom pli detale ol la nura mencio en Esperanto Panorama. Lingvo ekzercantoj povus tiel fari iom da bel-stilaĵoj.

Kompreneble, tio signifas ankaŭ iom peni !

Tamen, se bonvolemuloj ekzemple ne havas tempon verki tut-pretajn artikolojn, ili ankaŭ povus tutsimple mencii - eĉ buŝe aŭ telefone - siajn novaĵojn al la redaktoro. Nur pensu pri tio !

Fakto nerefutebla estas, ke SE NI VOLAS, NI POVAS, sed denove kaj ripete, se ni mem ne ĉiuj kunlaboras, nia penado ne havas sencon !

Ek, do, amikoj, montru vian intereson !

Multan dankon.

JB

N I  ĈEESTIS ...

LA "TRI-LANDA RENKONTIĜO", en AUBEL.

Sabaton 19-an de septembro, en suna vetero, okazis en Aubel, Prov. Lieĝo, Tri-Landa Renkontiĝo, dum kiu inaŭguriĝis ESPERANTO-LABOREJO.

La inaŭguran solenaĵon enkondukis D-ro P. Denoel, skizante la procedon de la unua ideo ĝis la realigo de la entrepreno.

Post li paroladis, nome de " Kulturaj Aferoj de la Provinco Lieĝo ", S-ro Remouxchamps. Li kaŭzis al si entuziasman aplaŭdon, farante sian paroladon en Esperanto. Li cetere estis dekoraciita per la "Esperanto-ordeno : la Verda Stelo.

S-ro G. Maertens, prezidanto de UEA, mallonge sed klare remarkigis, ke Esperanto ne plu estas artefarita, sed vere natura, vivanta lingvo, rekonita pli kaj pli sur oficiala nivelo. Li memorigis i.a. la "Raporton Patterson".

Li ankaŭ altiris la atenton sur la instruadon kaj informadon de Esperanto, emfazante ke ĝi estas tre taŭga rimedo por kulturaj interŝanĝoj, ne metante en danĝeron aliajn lingvojn.

"Esperanto", kiel diris S-ro Chaves en la Brazilia Kongreso, "venas al ni sen armiloj. Ĝi estas universala ŝlosilo al pacaj interkontaktoj sur internacia tereno".

S-ro M. Demonty, prezidanto de BEF, emfazis la neceson pri taŭga informado, pere de korektaj rimedoj.

Plie esprimis dezirojn kaj gratulojn, S-ro P. Firmenich nome de la Germanaj partoprenantoj, S-ro H. Peters nome de Nederlandaj Limburganoj kaj J. Bovendeerd nome de Belgaj Limburganoj kaj nome de FEL.

La honorvino metis la ĉeestantaron en la bonan humoron por ke la tagmanĝo okazu en festa etoso en Abatejo Val Dieu.

Sekvis Di-servo en la abateja preĝejo, vizito de la "laborejo" kaj tre sukcesa distra vespero en kiu ĉefrolis aro da dancistinoj el Eupen per tre belaj duon-klasikaj dancoj, Ges-roj Closse per arte kunmetita serio da lum-bildoj kaj S-ro Clement Tholet per sprita kaj klaŭne prezentita prelego pri la malbona efiko de alkoholaĵoj.

Ni multe ĝojis la feston.



LA DUA FEDERACIA ESPERANTO-KONGRESO DE BEF.

Dum la unua semajnfino de oktobro okazis en Bruselo la 2-a Federacia Kongreso de BEF.

La partoprenantaro estis pliĝustadire "magra" el ĉiuj vidpunktoj, malgraŭ la fakto, ke ĝi estis senpaga ! Ĉu eble Esperantistoj ne ŝatas senpagajn aranĝojn ?
Nur 30-o da personoj ĉeestis, plej grandparte estraranoj ĉu de APE, ĉu de FEL, ĉu de FLEJA, ĉu de BEFA ĉu (kompreneble) de BEF.

La organizado en si mem ne enhavis malfacilaĵojn. Nur la tagmanĝo estis kaŭzo de malkontenteco !

Fakte, ni ne komprenas la organizantoj. Antaŭ kelka tempo, okaze de iu samspeca aranĝo, ili jam spertis ke la priservado en la elektita restoracio estis ege, ege malrapida kaj malgraŭ tio ili denove elektis la saman restoracion ! Imagu, la tagmanĝo daŭris proksimume 3 plenajn horojn !

Vespere, anstataŭ la anoncita distra vespero, ni ricevis la inviton forlasi la salonon antaŭ la 8-a horo !

Pri la dimanĉa programo, ni povas mencii nur la antaŭtagmezan ĝeneralan kunsidon, kiun ĉeestis malpli ol 20 personoj.

Rilate al la posttagmeza programo ni ricevis nenian informon.

Ni jes forte bedaŭras, ke preskaŭ neniu montris ian personan aprezon per sia ĉeesto pri la fakto, ke la organizintoj sukcesis aranĝi la kongreson senpage. Cetere, sin anoncis nur 13 personoj antaŭe, dum partoprenis 30-o da ili. Tio kompreneble ankaŭ estis kaŭzo de malfruiĝo en la tagmanĝa priservado.

---------

Ĉar la BEF-kongreso okazis pasintjare en Lieĝo, ĉi jare en Bruselo, BEF alvokas nun al okazigo de la venonta en aŭtuno 1982 ie en Flandrio.

Ĉu estas Flandra grupo, kiu pretas organizi ĝin ?

Bonvole anoncu vin al la BEF-ĝenerala sekretario.

----------

BEF cetere havas nun novan ĝeneralan sekretarion, nome
André MERTENS-GOOSENS, Achter d'Abdij 46, 1720 DILBEEK.
Ni deziras al li multe da kuraĝo kaj da sukceso !

NEKROLOGO

Ni bedaŭras la forpason de S-ino MAERTENS-SCHOUTEET. patrino de S-ron G. Maertens, je 20 09 1981 en la aĝo de 80 jaroj.

Al S-ro Maertens kaj lia familio niajn sincerajn kondolencojn.

REPREZENTANTOJ DE FEL

Sin anoncis kandidat-delegito por muzikamantoj, nome Albert CLAESEN, Zonnebloemstraat 7, 3610 DIEPENBEEK 011/33 66 03

Interesitoj, jen interesa adreso !

-------

Nova kerno ekestis en Oostende, reprezentata de A. D'HULSTER, P. Michielslaan 10, 8400 Oostende, 059/80 06 95

INTERNACIA SEMAJNFINO

Nepre ne forgesu la Internacian Semajnfinon de nia Junularo, kiu okazos dum la semajnfino de 30 10 - 01 11 1981 en Lichtaart.

Ni esperas por ili multopan partoprenon kaj por ni .. detalan raporton por INFORMILO.

KURSOJ

Ĝis nun ni ricevis informojn pri kursoj el Antverpeno, Loveno k. Mortsel. Laŭ "oblikva" vojo ni ankaŭ aŭdis, ke okazas kurso en Aalst.

Ĉu ni ankoraŭ foje povas insisti pri la neceso informi nin pri tiuj aferoj kaj ensendi la listojn de la lernantoj !?

Tio tamen ne kostas tiom da laboro, ĉu ?

KORESPONDPETO

El Pollando ni ricevis leteron de 17-jara knabino, kiu en 2 jaroj sukcesis lerni Esperanton, krei Esperanto-kernojn en 12 (dekdu) lernejoj kaj iĝi prezidanto de "junulara vojevodia (=provinca) Esperanto-movado" Komprenoble, por sukcesi ŝi bezonas korespondadresojn. Temas pri :

Anita NOWAKOWSKA
PL-75-546 KOSZALIN
ul. Szymanarskiego 2/12, Pollando.



P R O T O K O L O

pri la administrantara kunsido de sabato 3-a de oktobro 1981, okaze de la 2-a Federacia Kongreso de BEF en Bruselo.

Prezidas : Edward SYMOENS
Protokolas : Jan BOVENDEERD
Komenciĝo : 17.00 h.

Pro la fakto, ke diversaj personoj devas forlasi la kunvenon sufiĉe frue, la prezidanto tuj surtabligas la plej gravan punkton de la tagordo :

1. ADMINISTRA REORGANIZADO

La temo mem jam estis enkondukita per INFORMILO, septembra numero, en la artikolo " Ĉu, aŭ ĉu ne ? "

Temas do pri la centralizo de la financa administrado.

Post longa, detala pridiskuto, la ĉeestantaro akordiĝas pri la principo kaj pri "aliĝilo" (kiel tiu, kiun ĉiu kadromembro intertempe jam ricevis pere de speciala numero de INFORMILO, ndr).

Rilate al la kotiz-dispartigo grupoj/FEL, estis tri proponoj :

a. iu % el la kotizoj al la grupoj;

b. nenio el la kotizoj, sed subvenciado de la aktivecoj

c. - iu % + subvenciado de la aktivecoj

La estraro, kiu jam detale pridiskutis la aferon kun la estraro de FLEJA, proponas, subtenate de la reprezentanto de FLEJA (K. Tytgat), solvon'c', do : iu % el la kotizoj + subvenciado de la lokaj aktivecoj.

Sekvas preskaŭ senfina, peniga diskutado, en kiuj la ĉefaj kontraŭstaroj venas el la angulo de Kalmthout.

Unu el la argumentoj kiu ĉiam denove revenas estas, ke la grupoj ne povas labori sen mono kaj, ke plej multe el la grupoj havas kiel nuraj enspezoj la parton kiun ili ricevas el la kotizoj. (W. De Smet)

Al tio respondas :

Ivo Durwael : Por grupoj, kiuj vere volas labori, la parto el la kotizoj estas pretervidebla, ĉar ĉiukaze tro malgranda. Ili jam mem zorgas por la necesaj enspezoj laŭ diversaj manieroj (pensu ekzemple pri LA VERDA STELO, ESPERANTO-2000 k.a.)

Edward Symoens : Kiam S-ro De Smet organizis SUK, antaŭ kelkaj jaroj, li

tiam ja ankaŭ trovis la necesajn fontojn. Kial do ne nun ?

JB. Ni ne forgesu ke, se la grupoj volas diskonigi siajn komunikojn ktp. pere de INFORMILO, ili jam regajnas seriozan parton de la elspezoj, eĉ se nur el la afrankoj. Same, en la nova situacio, la grupaj kasistoj ne plu devos mem zorgi por la memorigo de siaj membroj pri la necesa repago de la kotizoj ktp. Do, se ili iom perdas unuflanke, ili retrovas tion de la alia flanko.

Finfine decidiĝas voĉdone adopti solvon"a"provizore por unu jaro laŭ la proporcio 50/50.

Okaze de la venontjara aŭtuna administrantara kunsido, ni vidos la rezultaton kaj povos decidi plie.

Tiu diskutado foruzis praktike la tutan disponeblan tempon kaj la paciencon de kvanto da ĉeestantoj, tiel ke la aliaj punktoj povis esti nur supraje menciitaj.

2. FIKSDATAJ MONDEPONOJ.

Konsidere al la financa situacio kaj al la fakto, ke la ministerio pagas nur la duonon de la subvenciojn, kiujn ni normale rajtus ricevi, la estraro faras novan alvokon al ĉiuj por malfermi Ŝparkonton ĉe FEL, laŭ la kondiĉoj publikigitaj en la maja 1981 numero de INFORMILO kaj ESPERANTO PANORAMA.

Ni scias, ke laŭ aliaj sistemoj estas eble ricevi iom pli altan interezon, sed se ni interesiĝas pri la bonfarto de FEL kaj volas kunlabori en tio, ŝajnas al ni ke ni povus almenaŭ ION fari favore al la ĝenerala stato.

3. ELDONKONTO.

Kvankam en la antaŭa estrara kunsido decidiĝis lasi tiun ĉi punkton nemenciita, la sekretario tamen surtabligas ĝin.

FEL, kunlabore kun SONORILO (kiu okupiĝos pri la disvendado) eldonos la infanromaneton de Rik de Roover : " LA AVENTUROJ DE ŜPAR- KAJ ALIA PORKO".

La intenco estas daŭrigi la eldonadon de valoraj verkoj de Flandraj verkistoj, sed por tio bezoniĝas mono, kompreneble.

Se nun estus personoj kiuj pretus doni al sia financorganizo permanentan pagordonon de BF 100,- monate, ni povus, sen tro da malfacilaĵoj, kolekti tiun monon.

Cetere, Rik de Roover, kiu gajnis premion en la Belartaj Konkursoj -

# F L E J A

Estrar-kunsido de sabato 3-a de oktobro en Bruselo, Fortstrato 35 A

Ĉeestas : Kiky Tytgat, Gerd Jacques, Anne Tilmont, Ilse Jacques, Jean Pierre VandenDaele, Bob Venhuizen kaj Albert Dekker.

Komenciĝo : 10.30 h.

T A G O R D O

1. Fiancoj : prokrastite.

2. Kongresoj :
En la antaŭa protokolo la tekstoj de IJK kaj UK intermiksiĝis. Jen ili en bona ordo :

IJK (22 08 81 : korekto de la antaŭa protokolo) :
Preparado de aliĝiloj kiujn la aliĝontoj devas ricevi antaŭ la 15-a de januaro 1982 (fino de la unua aliĝperiodo). Distribuo prefere ekde la 1-a de oktobro 1981. Kotizoj pagotaj en UEA-konton.

Luado de tendoj. Kiu scias kiel trovi tablojn, seĝojn kaj telerojn malmultekoste luatajn ?
Preparo mem de la matenmanĝoj por malaltigi la kotizojn.
Ne-esperantsitoj kiuj venas por pretigi al la IJK-anoj la matenmanĝojn, pagos mem la dormadon kaj manĝojn.

Stampilo kaj leterpapero kun la insigno de la IJK devus esti faritaj kiel eble plej baldaŭ, ĉar ni jam povus uzi ilin nun. Gerd priparolos tion dum la sekvonta LKK-kunsido en Leuven (27 08 81).
Estos speciala taga poŝtstampilo dum IJK. Ĝi povos esti uzata sur poŝtmarkoj specialaj de la UK.

IJK (03 10 81)
Pere dela revueto KONCIZE ni povus eviti la GEJ-rifuzon pri la sendado de aliĝiloj por IJK Loveno. Krome ili povos esti presitaj en aŭ aldonitaj al JEN/KONTAKTO/E°-PANORAMA aŭ disdonitaj dum kongresoj (ekzemple Lichtaart kaj ISO). Jam 8000 aliĝiloj estas pretaj.
Konsiderinde ankaŭ estas la propono por pagi la kotizon de 20 Hungaroj (tiel 20 Belgoj povos partopreni la junularkongreson en Hungario, kies kotizoj estus pagotaj de la Hungara Junulara Asocio).
Aperigi en E°-PANORAMA kaj E° en Belgio anoncon pri la komplezo de nejunularoj por pagi la kotizojn por gejunuloj el orienta Eŭropo.

UK (22 08 81 : korekto de la antaŭa protokolo) :
Preparado de la ejo (Kloosterstraat/Antwerpen) se ni povos lui tiun lokon.
Kiu havas ideojn por junulara posttagmezo kiu okazos antaŭ la IJK-Loveno ?

3. Kasedoj por blinduloj.

- FABE ne resendis ĉiujn kasedojn.
- Elspezoj

| Elspezoj | | Enspezoj | |
|---|---|---|---|
| luado de la studio | BF 3.000 | subvencio de FLEJA | BF 3.000 |
| originala bendo | BF 500 | abonoj | BF 1.450 |
| 16 kasedoj je po BF 50 | BF 800 | | |
| ekspedo | BF 400 | | |

Kvankam deficito eta, ne multe valoras pludaŭrigi tiun ĉi agadon por nur 4 personoj. Necesas pli, pro tio, ke aperu alvoko en JEN(aŭ en aldono al E°-PANORAMA) por varbi interesiĝulojn por ĉi tiuj kasedoj. Anne prizorgos tion.

4. Lichtaart.

Enskribintoj : 70 el kiuj multaj novaj junuloj. (90 kun kunlaborantoj).
Kiam alvenos blinduloj, ni prizorgos ilian gvidadon.
Subvencio jam estas petita. Ĝi estas en preparo. La ero pri Montesori-instrumetodo estas en ordo.
Frank Platteau ĝis nun ankoraŭ nenion prezentis; ĉu li faros tion ankoraŭ ?
Nepre kontakti aliajn parolantojn por starigi programon, sed ankaŭ tio dependas de Frank.

Ĝanfranko nur buŝe promesis sian kunlaboron, do restas necerteco pri lia veno.

5. Diversajoj.

- Infanĉambro (Frankrijklei, Antw.) en Hodler-domo : montriĝis, ke FEL subluigas ĝin, do FLEJA devas lui de FEL. Prokrastita.
- FLEJA-kotizoj estos fiksitaj post interkonsento kun FEL, inter 100 kaj 150 F. (FLEJA petos repagon de FEL ĝis 100 F.). Junulanoj ricevas por tiu ĉi sumo JEN kaj KONCIZE, do la proponita aliĝformularo de FEL ŝanĝiĝus.
- La financa komisiono de FEL devas ankoraŭ kunveni kun Gerd rilate al la FLEJA-buĝeto 1982.
- Gerd petos al Paul Peeraerts ĉu li pretas esti alia subskribanto sur niaj ĝiriloj kaj ĉekoj, krom Kiky, Luc kaj Gerd.
- Anne Tilmont daŭrigos la kontaktojn kiujn ŝi havis kun American Field Service (AFS) rilate Esperanton.
- Leterpapero : ĝi povos simili al tiu de FEL. La insigno nepre menciu la mallongigon FLEJA kaj situiĝu supre, sekvate de FLANDRA ESPERANTO JUNUALRA ASOCIO, esperanto- kaj nederlandlingve.
- Estonta kunsido okazos en Lichtaart.

Fino : 12.30 h. protokolis : Jean Pierre VandenDaele.



Infanliteraturo, promesis verŝi la sumon kiun li ricevos el tiu premio, kiel bazan kapitalon kaj krome pagi BF 100 monate !

Kun aproba murmuro, diversaj personoj sin deklaras pretaj doni al sia banko la necesan permanentan pagordonon.

Kiel agi ?
Pagigi ĉiu monate BF 100 en la konton 402-7069801-50 de Flandra Esperanto-Ligo, menciante "ELDONOJ".

Jen ekzemplo :

ASLK — UNIVERSELE REKENING NR. 001-0073007-42

Nieuwe | ~~Wijzigende~~ (1)

DOORLOPENDE OPDRACHT

Ondergetekende : [illegible] houder van bovenvermelde rekening.
wonende [illegible]
geeft de opdracht om de 1ste van elke maand van 01 11 81 tot
met een onderbreking van tot het bedrag van 100
te betalen

☐ Door overdracht op Prk.-nr. ☐ Op andere rekening (te specifieren)
☒ Door overdracht op bankrekening nr 402-7069801-50
☐ Door overdracht op universele rek. nr. ☐ Per postassignatie

BEGUNSTIGDE : naam en voornaam (2) : VLAAMSE ESPERANTOBOND
Straat en nummer : FRANKRIJKLEI 140
Postcode 2000 Plaats ANTWERPEN
Mededeling ELDONOJ

Datum en handtekening van de rekeninghouder. 14.10.81
Stempel van het agentschap

(1) Doorhalen wat niet past.
(2) Drukletters a.u.b.
Elke herroeping of wijziging van dit order zal medegedeeld worden per aangetekend schrijven aan de hoofdzetel of door het ondertekenen van een dokument in een agentschap, 15 dagen voor de vervaldag.

PER COD WVB
NODIGE GEDAAN — DATUM — BEAMBTE

La estraro anticipe kore dankas al ĉiuj bonvolemuloj.

4. KADROKURSOJ

Konstatinte, ke la kursoserio estas ne kompleta, decidiĝas aldoni du pliajn studotagojn :

- 05 12 1981 : debat- kaj kunven-teknikoj, gvidota de Paul Peeraerts
- 27 02 1982 : administrado/financado, gvidota de Gregoire Maertens.

al tiu ĉi lasta gravas la partopreno ankaŭ de la grupaj respondeculoj-kiuj,do, laŭ tiu ĉi vojo estas invititaj partopreni. Kiel ĉiuj aliaj, ankaŭ tiu ĉi okazos en la Esperanto-domo en Antverpeno.

5. BULTENDISSENDO

UEA, pere de sia estrarano pri landa agado, invitis la Landajn Asociojn sendi siajn novajbultenojn al ĉiuj komitatanoj de UEA kaj al la Landaj Asocioj. La sekretario faris rapidan kalkulon de la kostoj kaj trovis ke tio kostus al FEL ± 22.000 BF. Tiu sumo estante tro alta, ni ne povos plenumi la inviton de UEA. Ni jes povos daŭrigi la alsendon al la estraranoj de UEA kaj reciproke al tiuj landaj asocioj, kiuj sendas al ni sian bultenon.

La sekretario tiel respondos al S-ro Corsetti de UEA.

6. DIVERSAĴOJ

1. Kelkaj el la ĉeestantoj legis en Heroldo de Esperanto, ke FEL ricevis por 1980 ŝtatan subvencion de BF 405.000.
   Ĉiu miras pri tio, ĉar ja antaŭ jaroj estis decidite ne plu komuniki ciferojn por eviti miskomprenojn, des pli ke la subvencioj, kiujn ricevas FEL, nur et-parte apartenas al FEL. La komuniko do povas nur konfuzi.
   Oni sin demandas kiu estus povinta komuniki tion al HdE ? La sekretario povus informpeti al HdE, sed tiu ĉi pli ol verŝajne ne volos komuniki siajn fontojn.
   Bedaŭrinde !
2. La LKK de la Universala Kongreso kaj de Internacia Junulara Kongreso insiste petas la grupojn organizi antaŭ la fino de la jaro almenaŭ unu klubvesperon pri la kongresoj kaj multe ŝatus ricevi eventualajn sugestojn rilate al la organizado, ekskursoj ktp. Ankaŭ kunlaborantoj estos pli ol bonvenaj !
3. Novaj-bultenoj - Aspekto.
   S-ro Maertens pledas por ke niaj novajbultenoj en nacia lingvo (ekz. E°-PANORAMA) estu kiel eble plej bone prizorgataj kaj aspektu kiel eble plej belaj por servi kiel informilo/propagandilo por la ne-esperantista publiko.
   Ni do serĉu rimedon por adapti E°-PANORAMA al tiu neceso kaj klopodu produkti bel-aspektan, riĉenhavan revuon.
   Por la interna informado taŭgas INFORMILO, kvankam ankaŭ ĝi povas esti multe pli kompleta.
   Bonvenas sugestoj kaj .... kunlabor(ant)o(j).

Fino : 19.30 h. JB



KLUBA VIVO - PROGRAMADO.

S-ro Tadeo ILOW el Aŭstralio faras prelegvojaĝon en Eŭropo. Li intencas viziti Belgion en novembro, dum nelimigita tempo, sed prefere post la 13-a de novembro. Li prelegos pri Aŭstralio kaj pri pilgrimado al Santiago di Compostella (± 150 diapozitivoj).
Li akceptas la kompenson, kiun la grupoj ofertas. Li ŝatas ankaŭ viziti la landon kiel turisto. Mi proponis al li repagon de la vojaĝkostoj de unu klubo al la alia (en Belgio) kaj tranoktado.
Ĝis nun invitis lin : Lieĝo (09 11), Bruselo (10 11), Bruĝo (12 11), Antverpeno (13 11). Ankaŭ Gento kaj Loveno interesiĝas pri lia vizito.
Ĉar mi akceptis kunordigi ĉion, interesataj tuj telefonu al 031/40 30 92.
Ivo DURWAEL.

LA VERDA STELO - ANTVERPENO

Vendredon 9-an de aprilo 1982 prelegos en LVS S-ro Tyburcjusz TYBLEWSKI el JENELIA GORA, Pollando, post partopreno en la Monda Kongreso "LABORA TEMPO-LIBERA TEMPO".
S-ro Tyblewski, kiu estas psikologo/sociologo, pretas :
1. prezenti prelegojn aŭ gvidi (partopreni) diskutojn pri :
   - psikologiaj faktoroj de personeco
   - kondiĉoj de interpersona ekvilibro
   - formiĝo de esperantista personeco
   - internacia turismo de esperantistaro
   - sentoj en turismo
   - Esperanto-literaturo
2. gvidi grupajn ekzercojn de memrekonado (aŭtodiagnozo)
3. Esti utila en la interhoma kunlaboro per aplikado de Esperanto kaj siaj fakaj scioj.

Informas Ivo Durwael.

ELDONEJO-LIBROSERVO SONORILO informas :

Okaze de la jarfinaj festoj, SONORILO estos je via dispono je la 22-a kaj 23-a de decembro de 10.00 ĝis 12.15 h kaj de 14.15 ĝis 18.00 h.

Kiu mendos por pli ol BF 1000 ricevos donacon.

Listo pri la haveblaj periodaĵoj, kiujn peras SONORILO, estas havebla sendante poŝtmarkon de BF 9,-.

"EL POPOLA ĈINIO" regalos per belega arta kalendaro 1982 ĉiun, kiu abonos la revuon antaŭ fino de februaro 1982.
Mendu ĉe SONORILO. Prezoj : 1-jara abono : BF 180, 2-jara : 300 BF 3-j.: 450,-BF

el "UN kaj NI" 22.

La temo de la Universala Kongreso 1982 en Antverpeno estos "Generaciaj aspektoj de la Esperanto-movado". Tion decidis la Estraro de UEA, konforme al la Monda Konferenco pri Aĝado, organizita de UN por la sama jaro en Vieno.

KULTURO

Kiu ankoraŭ ne scias, ke okaze de la UK en Brazilio, gajnis premion en la Belartaj Konkursoj - Infanliteraturo, nia ĉies amiko Rik de Roover†.
La premion li gajnis per : "LA RUĜA HIRUNDO".

Rik de Roover afable permesis al ni publikigi la verkaĵeton.
Jen ĝi :

## L A   R U Ĝ A   H I R U N D O

En Bronzomonto vivis homoj tute ordinaraj. Nek pli stultaj, nek pli prudentaj, nek pli kontentaj, nek pli malkontentaj ol la aliaj homoj. Multaj estis geedziĝintaj, havis infanojn aŭ ne. Aliaj estis solaj kaj ne havis infanojn. Ĉiuj laboris por sia ĉiutaga pano. Unuvorte : Bronzomonto estis vilaĝo tute simila al la plejmulto de la aliaj vilaĝoj, kun simplaj normalaj enloĝantoj.

Tamen, pri unu el ili ni devas fari escepton. Estis Kobo Ŝelo, la ŝuisto.

Kio estis do pri li? Aŭskultu, li estis ade malbonhumora. Pro tio li havis malmultajn amikojn. Moke oni nomis lin : Kobo Kelo. Kial li estis do ne bonhumora? Ĉu mankis io al li? Ĉu li estis malsana? Ne ! Ĉu li estis malriĉa ? Ne ! Ĉu li suferis pri doloroj ? Ne ! Li havis nek edzinon, nek infanojn, sed pri tio li neniam plendis. Li havis beletan dometon kun plaĉa ĝardeno. Per la flikado de ŝuoj li sen tro da peno kapablis perlabori siajn vivrimedojn. Sed tamen li estis ne kontenta. Kial do ? Ĉu li mem sciis ? Mi supozas ke ne.

Iun tagon, kiam unu el liaj klientoj estis aŭdinta profundan sopiron, ĉi tiu diris :

- "Aŭskultu Kobo, mi kredas ke vi ne estas feliĉa. Vi sopiras. Viaj okuloj estas malgajaj."

- "Kion fari ? Mi ne povas malhelpi tion." Kobo denove sopiris.

- "Vi devus trovi la ruĝan hirundon", la alia respondis.

- "La kion ?"

- "La ruĝan hirundon."

- "Kio estas pri la ruĝa hirundo ?"

- "Kiu ĝin posedas estas feliĉa. Kredu min !"

- "Fabeloj ! Nur fabeloj !", malestime vokis Kobo, dum la kliento kapskue foriris.



Tamen, ekde tiu tago, la eldiron de la kliento li ne plu kapablis forgesi. Kaj de tiam li pli ofte ol ordinare priatentis la hirundojn, kiuj ofte rondflugis en la vilaĝo kaj kies nestoj tie, tie troviĝis kontraŭ la muroj aŭ sub traboj en staloj. Sed kompreneble estis tute ordinaraj hirundoj. Bluaj kun ja tre malgranda ruĝa makulo sur la gorĝo. Sed unu ruĝa makulo ne sufiĉas por havi ruĝan hirundon.

Alproksimiĝis la aŭtuno kaj la hirundoj ariĝis sur la fadenaro de la telefonfostoj, ĝis, iun matenon,ili flugis for al ege malproksimaj landoj.

Kiam li konstatis tion, pli eĉ ol antaŭe, la humoro de Kobo Ŝelo sinkis en la kelon. Li ne plu havis kuraĝon. Kaj iun tagon li ne plu kapablis reteni sin kaj li decidis, same kiel la miloj kaj miloj da hirundetoj, sekvi la vojon suden.

- "Se la ruĝa hirundo ekzistas", li pensis, "tiam certe mi devas ĝin serĉi inter la aliaj tutordinaraj hirundoj."

---

Post plurmonata vagado surtere kaj surmare, li alvenis en pli varman regionon. Tie li denove malkovris siajn hirundojn karajn. Laŭŝajne ili estis tie same hejme kiel en Bronzomonto. Li tamen ne.

Ĉio tie ŝajnis stranga al li: la homoj, ilia lingvo, la pejzaĝo, la aero, la kreskaĵoj. Foje li bedaŭris esti forlasinta sian domon. Sed sufiĉis la ekvido de ununura hirundo por forigi lian bedaŭron. Kaj denove li pluvagadis kaj serĉis ... LA RUĜAN HIRUNDON DE L'FELIĈO !

Iun tagmezon, kiel laŭkutime, li sub la ĉiela tegmento manĝis siajn buterpanojn. Li sidis sur altaĵeto, kie antaŭe estis starinta ventmuelilo. Subite gajaj infankrioj trafis liajn orelojn. Liaj okuloj serĉis de kie ili venis.

Antaŭ freŝe kalke blankigita farmbieneto ludis du infanoj, knabo kaj knabino. Foj-foje kantanta patrino ekaperis, ne ĉesigante sian trikadon, por ĝui la ludadon de siaj gebuboj. Iom pli malproksime, sur apuda kampo, laboris juna viro, kaj ofte li plaĉe rigardis la ĝojplenan faradon antaŭ sia bieneto.

- "Se tiuj ĉi uloj ne estas feliĉaj", pensis Kobo Ŝelo, "mi ne scias kiu estas !"
Kaj samptempe li rimarkis hirundon fluganta el la stalo. Subite ĝi flugturniĝis super lia kapo kaj ...ŝajnis al li kvazaŭ lia koro haltas. Ĉu la birdeto ne estis ruĝa ? Pli atente liaj okuloj sekvis ĝin, kaj pli kaj pli evidentiĝis al li ke ĝi estas ruĝa.

Li forgesis ĉion : la blankan farmbienon, la infanojn, la kamparanon, nur ne la hirundon. Li ekstaris kaj alproksimiĝis al la stalo. Kiam la birdeto, antaŭ ol malaperi en la varman malhelon de la stalo, dum momento alkroĉiĝis al la muro, tiam li tutklare vidis ĝin.

- "Ĝi estas ruĝa, ruĝa kiel floranta papavo ! Ĝi estas LA HIRUNDO DE L'FELIĈO !!", ki ĝojplene kriis, dum li kuris al la stalo.

Sed ne longe la ĝojo daŭris, ĉar subite iu prenis lin ĉe la nuko, kaj samtempe furioza hundo saltis sur lin. Kobo Ŝelo devis fuĝi por savi sian vivon.

Sed, ekde la momento kiam li kredis sin ekster danĝero, li haltis. Li atendis la malheliĝon kaj tiam, kiel ŝtelisto, tra fosoj kaj kavaĵoj, laŭlonge de heĝoj kaj arbedoj, li kaŝiris ĝis tuj antaŭ la farmbieno. Tiam li ekkuŝis teren ĝis tuta malheliĝo.

Sed la enloĝantoj de la feliĉa farmbieno estis singardaj. De malantaŭ la kurtenoj ili ŝtelrigardadis. Interne staradis la virino kiu ade spionis tra la fende malfermita pordo, kaj la farmisto sidadis en la stalo kaj en sia dekstra mano li premis la tenilon de peza hakilo.

La ruĝa hirundo estis ankoraŭ en la stalo, sed iu alia volas kapti ĝin. La feliĉo estas minacita. Ne plu oni kantis.

Estis nokto nun. Ĉiuj birdoj dormis nun en sia nesto kaj kovris sian kapeton per flugilo. Piedpinte la kamparano supreniris per ŝtupetaro al la nesto en la stalo. Sian larĝan manon li metis sur la malfortikan birdokorpeton. Peze bruecis la rigliloj de la stalpordego kiam la kamparano malfermis ĝin por kaŝi sian altvaloran kaptaĵon en pli sekuran lokon. Sed tiam siavice iu atakis lin. Estis Kobo Ŝelo. Por defendi sin la kamparano devis ellasi la birdeton. Ĉi tiu, tute blindigita en la nokta malhelo, flugis tien kaj ree. Foje Kobo, alian fojon la kamparano, jen prave, jen malprave, kredis vidi ĝin kaj postkuris ĝin, ĝis finfine ili serĉis dise unu de la alia.

Ekde la tagiĝo tamen la hirundo reakiris sian vidkapablon kaj forflugis malproksimen de la farmbieno, kie ĝi estis travivinta tiom da ongoro.

------------

Dume Kobo Ŝelo kaj la kamparano, disde unu de la alia, vagadis tra la mondo por kapti la ruĝan hirundon.

Iun tagon la hirundo alvenis al soleca neenloĝata dometo. La subtegmenta fenestreto estis malfermita. Ĝi flugis internen. Tie ĝi masonis nesteton kontraŭ trabo.

Post longa kaj vana serĉado la kamparano ne plu kapablis regi sian hejmsopiron kaj li decidis reiri al sia dometo, al sia edzino kaj du infanoj, al siaj brutoj, al sia kamparo.

Kobo Ŝelo tamen, kiu havis nek edzinon, nek infanojn, pluserĉis la ruĝan hirundon.



Sed foje li trovis survoje pecon de ŝelo. Kaj subite li iĝis tre malgaja, kaj li komencis alparoli la senvivan lignaĵon.

- "Ŝelo", li diris, "vi nomiĝas kiel mi. Kion vi faras ĉi tie, malproksime de via trunko. Tie vi devus esti. Ne ĉi tie en la polvo de la vojo. Sed ankaŭ mi estas ŝelo, ankaŭ mi devus esti ĉe mia trunko. Nun mi komprenas ke ankaŭ mi apartenas al trunko. Ĝi estas Bronzomonto, mia dometo, mia metio, mia ĝardeneto. Ĉu prefere ankaŭ mi ne reiru al ili ?"

Tion li faris.

-------------

Kiam li revenis en Bronzomonto, li deziris nur unu aferon : retrovi sian dometon. Ĉion alian li estis forgesinta.

Kiam de malproksime li vidis ĝian silueton, li ekploretis pro granda emocio. Li eniris kvazaŭ ĝi estus templo. Ĉio estis kiel antaŭe, nur iom kovrita de polvo. Mirinda paco venis en lian koron. Tie kuŝis, kiel miniatura praarbaro, lia nekulturita ĝardeno. Li admiris ĝin.

Laca li supreniris la ŝtuparon. Tie estis lia lito, same kiel li forlasis ĝin. Sed kio okazis pri li ? Ĉu tiu varmo en lia koro ne estas la feliĉo kiun li vane serĉis ? Delikatmane li glatigis la litkovrilojn kaj skuis la kusenojn. Li ekdormis laca kun ombro de rideto sur siaj lipoj.

Supre, kontraŭ la trabo, kie pendis la lampo, ankaŭ dormis estaĵo kun koro ...

... L A R U Ĝ A H I R U N D O . . .

en sia arĝila nesto ....

Rik de Roover, 1981

--------------------

EL LA PROVERBARO, daŭrigo.

| | |
|---|---|
| Por pot' arĝila poto fera estas najbaro danĝera. | Met grote heren is het kwaad kersen eten. |
| Se malriĉulo sukcesas, li ĉion forgesas. | Als niet komt tot iet, kent iet zich zelve niet. |
| Trio plaĉas al Dio. | Alle goede dingen in drie. |
| Kiu ĉe l'vojo konstruas, tiun ĉiu instruas. | Wie aan de weg timmert, heeft veel berechts. |
| Mi blinde pafos, eble trafos. | Men weet nooit hoe een koe een haas vangt. |
| Kiu ne riskas, tiu ne gajnas. | Wie niet waagt, niet wint. |
| Komenco bona, laboro duona. | Een goed begin, is het halve werk. |

---------------

# 67-a Universala Kongreso de Esperanto 1982

**Arsenaalstraat 5, B-2000 Antwerpen**

Kara Samideano,

En la septembra numero de "Esperanto en Belgio" ni alvokis la belgajn esperantistojn al aktiva kunlaborado por la Universala Kongreso en Antverpeno.
Kelkaj gesamideanoj tuj reagis, sed ne sufiĉe multnombraj! Ĉu ni ree povas insisti por ke ĉiuj, kiuj intencas iamaniere fari "ion" por helpi nin, sin anoncu ek de nun. Ne atendu la lastan minuton! Se ni deziras perfekte organizi "nian kongreson", t.e. tiun de ĉiuj belgaj esperantistoj, kaj montri al la internacia esperantistaro kion ni kapablas fari, anoncu vin multnombre po[r] helpi en la akceptejo, dum la ekskursoj, por skribi artikolojn, por traduki tekstojn, ktp.

La "Dua Bulteno" aperos multe pli frue ol kutime, jam en la komenco de januaro, sed tio signifas ke je la fino de novembro ni transdonu al la Centra Oficejo konkretajn informojn pri
- loĝado (kategorioj kaj prezoj)
- ekskursoj (priskribo kaj prezo)
- ĝeneralaj vivkondiĉoj en Belgio : vetero, trinkmono, taksioj, ktp.
- la infana kongreseto.

Ni urĝe bezonas plurajn kunlaborantojn!

Pri la infana kongreseto respondecis S-ino Frederickx kaj edzo. Pro la tragika sortobato, kiu trafis tiun familion, ŝi ne plu povas plenumi tiun taskon. Ni do urĝege bezonas respondecul(in)on pri tiu kongreseto! Aŭ ĉu la belgaj esperantistoj estas tiel oldaj ke neniu kapablas gvidi tiun kongreseton?

Ne forgesu aliĝi al la kongreso!!

Belgio ja havas longan kaj ege valoran Esperanto-tradicion sed ni ankaŭ pruvu tion en Antverpeno.
Al la 45-a en Bruselo aliĝis 259 belgoj
64-a en Lucerno 154 svisoj
65-a en Stokholmo 428 svedoj
67-a en Antverpeno aliĝis ĝis nun nur 30 belgoj!

Vi sendu la aliĝilon rekte al Roger De Schepper kaj pagu en la poŝtĉekkonto 000-0457808-65 de 67-e Wereldcongres van Esperanto 2000 Antwerpen.
Permesu ke ni memorigu kelkajn kotizojn :

| | |
|---|---|
| - kongresano ne membro de UEA | 2750 BF |
| - edz(in)o de tiu kongresano | 1950 BF |
| - kongresano individua membro (MA) | 1850 BF |
| - edz(in)o de tiu kongresano | 1670 BF |

Pro la kolektiva abono al Esperanto, sufiĉas al la membroj de APE kaj FEL ricevi la jarlibron de UEA por aparteni al tiu lasta kategorio. Por la aliaj kategorioj vidu la aliĝilon.
Ne forgesu ke tiuj kotizoj validas nur por pagoj ricevitaj antaŭ la fino de la jaro!

Pliajn informojn vi povas ricevi de
Roger De Schepper, Doornstraat 22, 2610 Wilrijk, tf (031)272405
Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, 2180 Kalmthout, (031)666266